Esperantologio / Esperanto Studies **1** (1999), 38–47

Germana societo *Gesellschaft für Interlinguistik*

Detlev Blanke

Resumo. La kontribuaĵo diskutas kelkajn sciencpolitikajn problemojn en la kampoj de interlingvistiko kaj esperantologio. Ĝi skizas la neceson de sciencorganizaj strukturoj por la evoluigo de sciencaj aktivecoj en la disciplinoj interlingvistiko kaj esperantologio, aparte por ilia integriĝo en la sciencan pejzaĝon sur landa kaj internacia niveloj. La aŭtoro prezentas spertojn de la germana organizaĵo *Gesellschaft für Interlinguistik* (GIL, Societo pri Interlingvistiko) kaj resumas ties celojn, aktivecojn, ĝisnunajn rezultojn kaj problemojn.

Zusammenfassung. Der Beitrag diskutiert einige wissenschaftspolitische Probleme im Bereich der Interlinguistik und Esperantologie. Es wird die Notwendigkeit wissenschaftsorganisatorischer Strukturen für die Entwicklung und den Ausbau von Aktivitäten auf diesen Gebieten, insbesondere hinsichtlich ihrer Integration in die Wissenschaftslandschaft eines Landes sowie im internationalen Rahmen, skizziert. Der Autor berichtet über Erfahrungen der deutschen „Gesellschaft für Interlinguistik e.V." (GIL), über ihre Ziele, Aktivitäten, bisherige Ergebnisse und Probleme.

Abstract. This article discusses science policy in the areas of interlinguistics and Esperanto studies. It calls for the necessity of structures of science organization for the development and extension of activities in interlinguistics and Esperanto studies, in particular with regard to their integration into the scientific culture of a single country and worldwide. The author presents his experience with the German Society for Interlinguisitics (GIL), its goals, activities, achievements, and problems.

Enkonduke

Ne sufiĉas kapablaj homoj, oni ankaŭ devas aktivigi ilin kaj doni eblecojn por aktivado. Ne sufiĉas sciencaj ekkonoj, oni ankaŭ devas konatigi kaj disvastigi ilin. Rilate al la fakoj interlingvistiko kaj esperantologio tio signifas, ke necesas ĉi-rilataj strukturoj kaj agadkampoj. Elirante de tiuj bazaj ideoj en la sekva artikolo mi klopodas prezenti sciencan societon kun ĝiaj ĝisnunaj agadoj kaj rezultoj. Ligita al tio estas la espero, ke – laŭ la diversregionaj kondiĉoj – similaj aŭ aliaj organizaĵoj povus estiĝi ankaŭ en aliaj landoj. Internacia agado sur la kampo de interlingvistiko kaj esperantologio estas stabila nur tiam, se ĝi povas fruktuzi landajn aktivecojn kaj rezultojn.

1. Scienco bezonas organizajn strukturojn

1.1. Por profesiaj fakoj ĝenerale ekzistas universitataj institutoj, esplorcentroj, landaj kaj internaciaj institucioj kaj organizaĵoj diverstipaj. Ili faras sisteman esploradon en siaj fakoj, klerigas studentojn, tenas kontakton kun fakkolegoj kaj instancoj sur landa kaj internacia niveloj, ofte disponas pri periodaj kaj alispecaj eldonaĵoj kaj eventuale pri proporaj eldonejoj. Do, ekzistas sciencorganizaj strukturoj.

En multaj landoj ankoraŭ estas tre kutime, ke en sciencaj libroj aŭ revuoj lingvistoj kaj reprezentantoj de aliaj disciplinoj verkas pri planlingvoj kaj aliaj interlingvistikaj temoj, aparte pri Esperanto, sen granda kono de la koncerna faka literaturo aŭ ĉi-tiun plene ignoras.

Tamen, esploroj ja estas farataj kaj verkoj – kvankam tre malsamnivelaj[1] – aperas tiomkvante, ke eĉ specialistoj jam havas malfacilojn sekvi la evoluon (pri tio kp. Blanke 1996, 1998b). La esplorojn kutime faras izolitaj unuopuloj, kiuj ne nepre inter si flegas intensajn kontaktojn. Cetere, malmultas ĉi-kampe aktivaj profesiaj lingvistoj.

1.2. Ja ekzistas kelkaj strukturoj, stimulantaj kaj faciligantaj interlingvistikajn kaj esperantologiajn aktivecojn (sciencaj esploroj, klerigoj, aranĝoj kaj verkoj), kiujn eblas ĉi-tie nur nekomplete skizi, kvankam la laboro de ĉiuj meritus detalan priskribon de iliaj agadoj (kp. Blanke 1995, 1998a; Sakaguchi 1998:393ks). Tiuj strukturoj estas nombreblaj per kelkaj fingroj.

En *internacia kadro* la kampon iom stimulas kaj sekvas la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED, Probal Dasgupta, Klaus Schubert, Humphrey Tonkin, Marc van Oostendorp, Renato Corsetti, Mauro La Torre[2]) kun la revuo *Language Problems & Language Planning*. La Akademio de Esperanto nur sporade okupiĝas sisteme pri esperantologiaj temoj.

El historia vidpunkto oni povus mencii diversajn organizaĵojn, aparte la *Délégation pour l'adaption d'une langue auxiliaire internationale* (aparte Louis Couturat, Otto Jespersen kaj Léopold Leau), *Academia pro Interlingua* (kun ĝiaj antaŭuloj, poste vd. aparte la rolon de Giuseppe Peano), *International Auxiliary Language Association* (i.a. William E. Collinson, Alexander Gode) kaj la *Officium Interlinguisticum Budapestienses* (Dénes Szilágyi).[3]

Sur *landa nivelo* agadas kelkaj centroj kun malsamaj celoj, strukturoj kaj intenseco, i.a. en Aŭstrio (Internacia Esperanto-Muzeo, faka sekcio de Aŭstra Nacia Biblioteko, Herbert Mayer), Germanio (GIL, nia temo), Italio (Grupo Esperanto kaj Interlingvistiko ĉe la Itala Esperanto-Federacio, i.a. kun Renato Corsetti, Mauro la Torre, Daniele Vitali; krome eventuale Itala Interlingvistika Centro, i.a. kun Giorgio Silfer), Svisio (*Centre de documentation et d'études sur la langue internationale, CDELI*, Tazio Carlevaro, Claude Gacond) kaj Usono (*Esperantic Studies Foundation*, E. James Lieberman, David K. Jordan, Jonathan Pool, Humphrey Tonkin). En kelkaj universitatoj tra la mondo estas proponataj prelegoj kun interlingvistikaj kaj esperantologiaj temoj. Foje la studentoj verkas seminariajn kaj diplomigajn (magistrigajn) disertaciojn. Relative malofte estis defenditaj doktorigaj disertacioj. Plena integriĝo de la fako esperantologio en universitatan strukturon ĝis nun nur okazis en la Universitato Eötvös Loránd, Budapeŝto (1968 fondita de István Szerdahelyi kiel fako Esperanto: lingvo kaj literaturo, ĉe la Katedro pri Ĝenerala kaj Aplika Lingvistiko, daŭrigata [partatempe] de Ilona Koutny kaj ĝis nun de Zsuzsa Varga-Haszonits). Menciindas krome, ke en la universitato de Amsterdam estas nomumita

[1]Fojfoje eĉ interlingvistoj malŝate rilatas aŭ ignoras studojn de nelingvistoj. Tio estas grava subtakso de la laboro de amatoroj. Ili ofte ja bone reflektas realaĵojn de Esperanto en teorio kaj praktiko (ofte pli bone ol supraĵe verkantaj lingvistoj). Oni devas konatiĝi kun tiuj studoj, ilin kritike utiligi, se oni vere volas objektive reflekti pri interlingvistikaj kaj esperantologiaj temoj.

[2]Nur eblas mencii kelkajn konatajn fakulojn. Tio ne signifas ignoron de la kontribuoj de la nemenciitoj.

[3]Pri la *Academia pro Interlingua* kaj la *Officium...* vd. Silagi 1996.

eksterordinara profesoro pri interlingvistiko kaj Esperanto (Marc van Oostendorp). Lastatempe regulaj kursoj pri Esperanto kaj esperantologio ankaŭ okazas en Italio en la universitato de Torino (Fabrizio Pennacchietti) kaj esploroj en la Universitato de Romo (Mauro La Torre, Renato Corsetti). Internaciaj interlingvistikaj kursoj en 1998 komenciĝis en la universitato de Poznań, Pollando (Ilona Koutny).

El historia vidpunkto eblas mencii: en la siatempa Federacia Respubliko Germanio la Societon por Internacia Lingvo (Artur Bormann de 1952 ĝis 1984 eldonis la periodaĵon *Interlingvistika Informservo*), en Germana Demokratia Respubliko la Komisionon pri Interlingvistiko kaj Esperantologio ĉe Kulturligo de GDR (Viktor Falkenhahn, Georg-Friedrich Meier, Ronald Lötzsch, Detlev Blanke, dum la 70-aj kaj 80-aj jaroj), en Pollando la Akademian Centron Interlingvistikan ĉe la Universitato de Varsovio (Ryszard Rokicki, dum la 80-aj jaroj), en Sovetunio la Esplorgrupon pri internacia helplingvo ĉe la Akademio de Sciencoj de USSR (Evgenij A. Bokarev, Viktor P. Grigor'ev, Magomet I. Isaev kaj Sergej N. Kuznecov) dum la 70-aj kaj 80-aj jaroj. La menciitaj instancoj kaj organizaĵoj en siaj aranĝoj kaj publikigaĵoj havis malsimilajn esplorkoncentriĝojn, foje tio estis Esperanto kaj esperantologio, foje aliaj planlingvoj, foje lingvopolitikaj temoj. Depende de sia statuso ili flegis malsame intensivajn rilatojn al neesperantistaj lingvistikaj medioj.

Ĝenerale la situacio estis kaj estas nekontentiga. La agado ĝenerale dependas de unuopaj homoj, kiuj agas honorofice. Se ili malaperas, ofte ankaŭ malaperas la institucio. Ili nur malofte estas iel ligitaj al profesiaj sciencaj strukturoj. La limigitaj homaj kaj financaj rimedoj ege reduktas la ageblecojn.

2. La estiĝo de GIL

2.1. Historia fono kaj fondo.

Ĉar la plejmulto de la esploroj kaj aliaj sciencaj aktivecoj ankoraŭ estas realigataj sur landa nivelo – kvankam ĝenerale la sciencaj aktivecoj rapide internaciiĝas – por la rekono kaj statuso de interlingvistiko kaj esperantologio aparte gravas la landa kadro.

Des pli tiu vidpunkto gravis, kiam en 1971 kelkaj sciencistoj kaj science interesitaj esperantistoj en la kadro de Kulturligo de Germana Demokratia Respubliko fondis Komisionon pri Interlingvistiko kaj Esperantologio ĉe Kulturligo (KIEK). Ĝiaj membroj organizis sciencajn kunsidojn, seminariojn por aŭ kun lingvistoj en diversaj urboj kaj fine la iom konatiĝintan serion de entute 9 interlingvistikaj seminarioj en nordgermana ripozloko ĉe la Balta Maro, en Ahrenshoop.[4] Tiuj aranĝoj estis okazigitaj en la germana lingvo, ĉar destinitaj ekskluzive por profesiaj lingvistoj. Ili estis bone frekventitaj. La lingvistoj, inter ili vere renomaj, aktive partoprenis per prelegoj kaj diskutoj. La agado de KIEK havis pozitivajn efikojn al la integrigo de la fako interlingvistiko en la sciencan pejzaĝon de GDR. Ĝi i.a. plifaciligis kunkrei bonvenan atmosferon por la unuaj doktoriĝo kaj habilitiĝo pri interlingvistikaj temoj en GDR, kiun sekvis la oficiala ŝtata nomumo de (honoraria) docento en Humboldt-Universitato de Berlino (orienta). La agado de KIEK favoris la atmosferon inter profesiaj lingvistoj pri interlingvistiko ĝenerale kaj pri Esperanto aparte, kio plifaciligis la eldonon de profesiaj instruiloj en ŝtataj eldonejoj kaj la aperigon de sciencaj libroj kaj studoj en fakrevuoj (pri interlingvistiko en GDR kp. Blanke 1990).

[4] Pri tio kp. la raporton en IpI, 2-a serio (Varsovio), n-ro 6 (junio 1985), 1–10.

En GDR la laboro de KIEK, malgraŭ la menciitaj pozitivaj trajtoj, kompreneble estis ankaŭ negative influitaj de la limigoj siatempaj (i.a. malfacilaĵoj ĉe la interŝanĝo de sciencaj materialoj, limigo de vojaĝeblecoj kaj pro tio nesufiĉa persona kontaktado kun eksterlandaj kolegoj, burokrataj bariloj ĉe publikigoj k.s.).

2.2. Dezirante daŭrigi la interlingvistikan agadon en alia formo kaj sur tutgermana ebeno, en 1991 (6-a de aprilo) kaj surbaze de la ideoj, menciitaj sub 1.1, en la iama klubo de Kulturligo de GDR 12 orientgermanaj interlingvistoj kaj interlingvistike interesitaj personoj fondis *Gesellschaft für Interlinguistik, GIL* (Societo pri interlingvistiko), kiun mi sekve prezentas.

3. Pri la celoj kaj statuso de GIL

3.1. Celoj

GIL intertempe estas leĝe registrita kaj ŝtate rekonata kiel komunutila. Ĝi havas du agokampojn, internen kaj eksteren direktitajn:

a) La internen direktita agokampo
GIL celas kolekti kaj aktivigi interlingvistike/esperantologie kompetentajn kaj interesitajn koleg(in)ojn, precipe en Germanio (sed ne nur), plifaciligi al ili la internacian orientiĝon pri la daŭre aperanta fakliteraturo, ebligi al ili spertinterŝanĝon kaj publikigadon de iliaj materialoj kaj doni al ili la eblecon agadi en la kadro de scienca organizaĵo.

b) La eksteren direktita agokampo
GIL klopodas reprezenti la fakon interlingvistiko en la lingvistika medio.

La statute fiksitaj ĉefaj intereso-kampoj de GIL estas:

- popularigi interlingvistikajn sciojn kaj instigi resp. subteni esploradon kaj instruadon ĉi-kampe
- subteni nacian kaj internacian kunlaboron de interlingvistoj
- koncentri sian fakan agadon al jenaj ĉefaj kampoj:
    - internacia lingva komunikado
    - planlingvistiko
    - esperantologio
    - instruado de Esperanto kaj interlingvistiko en universitatoj kaj altlernejoj

Sub “interlingvistiko” GIL komprenas la sciencan disciplinon (aŭ kampon), kiu esploras la internacian lingvan komunikadon kun ĉiuj ĝiaj aspektoj. Tio inkludas etnajn lingvojn kaj planlingvojn (inter tiuj aparte Esperanton [esperantologio]) kiel *internaciaj* komunikiloj. Tia larĝa kadro estas pli perspektiva ol reale praktikebla, ĉar ĝi kompreneble ne estas plenigebla per la nunaj esplorkapacitoj de la t.n. interlingvistoj. Multaj lingvopolitikaj esploroj jam dum jardekoj estas farataj en diversaj disciplinoj, sen ke ili estas nomataj interlingvistikaj. Tamen la larĝa kadro ŝajnas al mi necesa, ĉar nur ĝi ebligas vere interdisciplinan esploradon kaj ĝustan enordigon de la planlingva temaro. En la praktiko ĉe la plej multaj interlingvistike aktivaj homoj la ĉefaj atentoj koncernas la planlingvojn. Sub “esperantologio” GIL komprenas la sciencan disciplinon, kiu esploras la fontojn, la strukturon, evoluon, funkcion, komunikan aplikon de Esperanto kaj la lingvan komunumon ligita al ĝi.[5]

[5] Parolante pri interlingvistiko ni inkludas la subdisciplinon esperantologio. Ne eblas

3.2. Membroj en neesperantista organizaĵo

3.2.1. Gravas substreki, ke GIL estas neesperantista organizaĵo. Ĝi estas senpartia rilate planlingvajn sistemojn kaj tute ne nur interesiĝas pri Esperanto. Tamen, ĉi tiu senpartieco, necesa por scienca organizaĵo, ja ne ignoras la fakton, ke Esperanto estas la sola planlingva sistemo, kiu evoluis de projekto al plene funkcianta lingvo kun larĝaj komunikaj kapabloj kaj apliko-terenoj. Principajn demandojn de la funkciado kaj evoluo de planlingvo pro tio nur eblas studi ĉe la ekzemplo de Esperanto.

3.2.2. Por fariĝi membro de GIL necesas aliĝpeto al la estraro, kiu akceptas aŭ malakceptas la peton. La estraro favoras profesiajn lingvistojn aŭ interlingvistike/esperantologie aktivajn homojn, kiuj kapablas labori sur scienca nivelo. La neesperantisteco de GIL estas grava karakterizaĵo de GIL. Pro tio ankaŭ lingvistoj, ne nepre interesitaj pri Esperanto mem kaj sekve ne regantaj la lingvon, trovas aliron al GIL. Ili ja povas esti interesitaj pri la problemoj de internacia komunikado, ne necese tro detale pri la fenomeno planlingvo. Aliaj nur havas ĝeneralan intereson pri planlingvoj kaj Esperanto. Ili eble neniam fariĝus membroj en esperantologia organizaĵo.

La lingvistika/filologia karaktero de GIL estas grava. Inter la 65 membroj de la organizaĵo (fine de 1998) troviĝas 44 personoj kun universitata lingvistika/filologia kleriĝo, inter tiuj 14 universitataj profesoroj[6] resp. docentoj (personoj kun universitataj instrurajtoj, t.e. – laŭ la germana modelo – kun *Venia legendi*,[7] resp. *Facultas docendi*, kiu estas la kondiĉo por fariĝi universitata docento aŭ orda, resp. katedra profesoro) kaj dek aliaj filologiaj doktoroj. Do la lingvistika karaktero de GIL estas klara. Tamen en ĝi ankaŭ membras el natursciencaj kampoj unu profesoro kaj ok doktoroj kaj reprezentantoj de aliaj profesioj.

3.2.3. GIL ne estas internacia organizaĵo. Ĝi estas leĝe registrita en Germanio.

Internaciigi GIL signifus, ke oni devus ŝanĝi la strukturon kaj la administradon kaj ne povus koncentri sin al la germana medio. Tamen GIL principe ankaŭ povas havi membrojn en eksterlando. Kaj ĝi jam havas tiujn. Inter la 65 membroj (fine de 1998) troviĝas personoj en Aŭstrio (3), Italio (1), Japanio (1), Svisio (2), Ĉinio (2), Nederlando (3), Francio (1), Hungario (1).

3.2.4. La neesperantisteco de GIL ne nur influas la enhavan profilon de ĝiaj konferencoj kaj eldonaĵoj, sed ankaŭ la lingvan reĝimon. Kvankam la lingva reĝimo statute

ĉi tie diskuti la malsamajn vidpunktojn pri la objekto de interlingvistiko. Pri la diversaj konceptoj kp. la superrigardojn i.a. ĉe Schubert (1989), Sakaguchi (1998:309ks), Blanke (1998a, 1998c).

[6] Ĉi-tie mi emfazu, ke mi neniel prijuĝas la sciencan kompetentecon de homoj unuavice laŭ akademiaj titoloj, sciante, ke en kelkaj medioj oni akiras tiujn titolojn laŭ dubindaj metodoj, en aliaj medioj titoloj tute ne estas uzataj ktp. Krom tio konatas, ke en diversaj landoj la statuso de la titoloj kaj la akirreguloj varias. Sed por la pozicio de GIL en Germanio gravas, ke la menciitaj titoloj estas akiritaj en ŝtate agnoskitaj universitatoj laŭ la kutimaj reguloj, validaj en Germanio. Aliajn titolojn mi neglektis.

[7] Komence de 1999 d-rino Sabine Fiedler (Universitato de Leipzig) per disertacio pri la frazeologio de Esperanto akiris la *Venia legendi* por Ĝenerala lingvoscienco / interlingvistiko (Kp. Fiedler 1998, krome IntI 29 (4/98) kaj 30 (1/99).

ne estas fiksita, la ĉefa lingvo estas la germana. Tamen, principe eblas prelegi kaj korespondi en ĉiu ajn lingvo. Por eksterlandaj interesitoj aliĝi al GIL tamen nur estus rekomendinde, se ili konas, almenaŭ pasive, la germanan.

4. La ĉefaj aktivecoj de GIL

La ĉefaj aktivecoj[8] de GIL estas:

- Eldonado de *Interlinguistische Informationen* (IntI) kaj de kromkajeroj de IntI
- Okazigo de la jarkonferencoj kaj aliaj aranĝoj
- Administraj aktivecoj

4.1. *Interlinguistische Informationen* (IntI) kaj *Kromkajeroj* al IntI

La regula aperigo de germanlingva informbulteno fakte estas la ĉefa aktivado de GIL.

Ĝis fino de 1998 aperis entute 29 kajeroj kun sume 298 A-5-formataj paĝoj. IntI havas ISSN 1430-2888.

La bulteno klopodas registri la ĉefajn interlingvistikajn/esperantologiajn aktivecojn tutmonde, kaj kompreneble aparte tiujn en Germanio. Ĝi estas bibliografie orientita sed ankaŭ enhavas raportojn, recenzojn kaj aliajn materialojn. Ĉiujare (en unu aŭ du kajeroj) ĝi prezentas detalan bibliografion pri interlingvistiko/esperantologio, kiu inkludas ankaŭ gravajn verkojn pri la internacia lingvopolitiko (aparte: eŭropa lingvopolitiko). La bulteno registras nur tiujn materialojn, kiujn la redaktoro ricevis, do ne kopias alies bibliografiojn.

Tiel novuloj, sed verŝajne ankaŭ spertaj interlingvistoj, kiuj ja ne povas sekvi la tutan literaturon, trovos superrigardon pri la eble ĉefaj materialoj, kiuj aperadas dum la jaro.

La bulteno ne nur iras al la membroj, sed ankaŭ al diversaj germanaj bibliotekoj, al internacie gravaj interlingvistikaj bibliotekoj, al konataj lingvistoj kaj aliaj interesitoj. Ĝi jam eniras la kutimajn lingvistikajn bibliografiajn servojn en Germanio kaj estas tie registrata.

Krom IntI ankaŭ aperas kiel serio A4-formataj *Kromkajeroj al IntI.* Tiuj kromkajeroj (*Beihefte*) de IntI (ekde la 5-a konferenco, 1995) enhavas la prelegojn de la jarkonferencoj, sed foje ankaŭ aliajn materialojn. Ili havas apartan ISSN: 1432-3567 (kp. Becker 1996, 1997, 1998; Becker & Wollenberg 1998).

4.2. La jarkonferencoj de GIL

Ĉiujare laŭstatute okazas jarkonferenco de GIL, ĝis nun ĉiam en Berlino (escepte de la dua). Ĝin kutime partoprenas 30–40 personoj.

Krom la administraj traktadoj, statute preskribitaj, okazas faka programo kun 9–12 prelegoj, kiuj estas dediĉitaj al kadra temo. Ĝis 1998 entute okazis 8 konferencoj.

Mi mencias la kadrajn temojn de la konferencoj, ĉar ili iom klarigas la enhavan profilon de GIL:

1. La fonda konferenco, 1991 04 06. Sen kadra programo.
2. *Interlingvistikaj aspektoj de la eŭropa lingvopolitiko*, 1992 10 16–18 (Bad Saarow ĉe Berlino)
3. *Lingvistiko kaj interlingvistiko*, 1993 10 15–17

[8]Pri GIL ankaŭ kp. la diversajn raportojn en *Informilo por Interlingvistoj* (IpI) n-ro 1/sekcio 6.2; 6-7/4; 10-11/2.2; 17/4; 18-19/2.1, 3.9; 21/6; 26/2.

4. *Esperantologio*, 1994 11 18–20
5. *Problemoj de la tradukado kaj interpretado en planlingvoj*, 1995 11 24–26
6. *Terminologi-sciencaj aspektoj de interlingvistiko*, 1996 11 15–17
7. *Socikulturaj aspektoj de planlingvoj*, 1997 11 15–17
8. *Interlingvistiko kaj leksikografio* 1998 11 06–08
9. *Lingvopolitiko en Eŭropo*, 1999 11 12–14 (preparata)

Dum la konferencoj regule okazas prezento de novaj interlingvistikaj eldonaĵoj, krome ekzistas libroservo.

La prelegantoj estas membroj de GIL resp. ligitaj al kolegoj de GIL.

Por pli efiki eksteren kaj plifortigi la kontakton kun aliaj lingvistikaj medioj GIL klopodas gajni prelegantojn ekster siaj propraj rondoj kaj klopodas aranĝi konferencojn kun aliaj partneroj, tiel ekzemple fine de 1999 kun la Societo por la Akcelo de Lingvistikaj Studoj el Berlino pri problemoj de eŭropa lingvopolitiko.

4.3. Administraj aktivecoj

La estraro de GIL komence de 1999 konsistas el 5 personoj (Sabine Fiedler, Werner Bormann, Roland Lötzsch, Ulrich Becker kaj Detlev Blanke) kaj klopodas gvidi la societon sen multaj burokrataĵoj. Estrarkunsidoj, plenkunsidoj de la membraro kaj membro-cirkuleroj (ĝis komenco de 1999 entute 18 eldonoj) estas la ĉefaj instrumentoj. Ili informas la membrojn de GIL pri aranĝoj, eldonaĵoj, novaj membroj, kotizoj kaj diversaj administraj aferoj.

5. Kelkaj rezultoj

5.1. La ĉefaj rezultoj

La cefajn rezultojn de GIL oni eble povas resumi tiel:

1. En la germana lingvistika pejzaĝo estas registrita la fakto, ke ekzistas sciencnivela societo, specialiĝinta pri interlingvistiko, kiu estas – laŭbezone kaj laŭ interesiĝo – kontaktebla kaj konsultebla. La membroj, lingvistoj aŭ – laŭ publikigaĵoj kaj universitata kleriĝo – alifake agnoskitaj specialistoj pri la temoj, ne estas facile ignoreblaj.

2. Studentoj kaj sciencistoj, interesitaj enprofundiĝi en interlingvistikajn kaj esperantologiajn temojn, ne plu dependas de la pli-malpli seriozaj informoj kaj ofte propagandecaj misinformoj, kutime riceveblaj de iuj esperantistaj organizaĵoj aŭ superentuziasmaj unuopuloj. Feliĉe Germana Esperanto-Asocio konscias pri la aparta rolo de GIL kaj peras sciencrilatajn demandojn aŭ kontaktinteresiĝojn al la societo.

3. La ĉefa faka materialo pri interlingvistiko estas registrita kaj laŭbezone disponigebla kaj alirebla (almenaŭ bibliografie).

4. Interlingvistike kaj esperantologie interesitaj personoj en la societo trovas certan kadron, kiu stimulas al propraj sciencaj aktivecoj kaj ebligas al ili prezenti, diskutigi kaj publikigi siajn materialojn (almenaŭ parte).[9] Ĉar tian medion oni kutime ne trovas en la Esperanto-komunumo kaj ties strukturoj, diversaj fakuloj eble pli emas resti aktivaj kaj malpli facile malaperas.

[9]Estas ĝojinde observi, ke la prelega kaj verka aktivecoj de la membroj kreskas. Certagrade tion ankaŭ GIL pozitive influas. Asparte menciindas du lastatempe aperintaj gravaj libroj, al kiuj la materialoj de GIL certe utilis (Sakaguchi 1998, Mattusch 1999).

5. Per la kontakto kaj subteno de eksterlandaj membroj ankaŭ ekzistas certa stimulado de interlingvistikaj aktivecoj eksterlande (ekzemple per tre aktiva membro en Ĉinio[10]).

5.2. Kelkaj rezultoj en kontaktado kun lingvistikaj kaj alifakaj medioj

La eldonaĵoj estas la ĉefa kontaktilo kun la profesia lingvistika medio. Krome kelkaj membroj estas aktivaj en la universitata medio kaj pli facile povas flegi personajn kontaktojn. Ili ankaŭ foje partoprenas lingvistikajn konferencojn (organizitajn ekzemple de la Societo pri Aplika Lingvistiko, Germana Societo pri Lingvoscienco, Leibniz-Societät, Expolingua k.a.), aŭ ili prelegas laŭ invito, ankaŭ eksterlande. Ankaŭ okazas, ke GIL kunorganizas fakan konferencon, ekz. tiun pri Wilhelm Ostwald en Humboldt-Universitato (kp. Becker & Wollenberg 1998). GIL ankaŭ aktive partoprenis la preparon de la internacia jubilea konferenco por Eugen Wüster en Vieno (kp. la raporton en LPLP 3/98, noto 11, p. 277ks, kaj revuo Esperanto 10/98). Ĝi okazigos sian 9-an jarkonferencon kune kun la *Verein zur Förderung sprachwisenschaftlicher Studien e.V.* (Societo por la Akcelo de Lingvistikaj Studoj).

Se interesitoj serĉas interlingvistikajn verkojn aŭ volas kontakti tiufakajn specialistojn, ili trovas informojn en manlibro pri lingvistoj (Kürschner 1994) aŭ en la gvida germana manlibro pri sciencistoj (Kürschners Deutscher Gelehrtenkalender 1996). Al tiu apartenas kompaktdisko, kiu enhavas i.a. elektajn bibliografiojn de kelkaj membroj de GIL. Ankaŭ la TTT-paĝo de GIL pli kaj pli estas uzata kaj peras kontakton ekz. de studentoj, doktoriĝontoj aŭ lingvistoj al GIL, kiuj bezonas fakajn informojn. La bulteno de GIL, *Interlinguistische Informationen*, estas regule menciata en grava lingvistika bibliografio (Bibliography of Linguistic Literature, Frankfurt/M: Klostermann). La enhavtabelo de IntI estas reproduktata en la monda informservo pri lingvistikaj revuoj, *CCL. Current Contents Linguistik. Inhaltsverzeichnisse linguistischer Fachzeitschriften* (Frankfurt/M: Stadt- und Universitätsbibliothek Frankfurt am Main).[11]

Do, la establita lingvistika medio en Germanio povas (se ĝi volas) trovi kontaktojn al la interlingvistika faka medio.

6. Problemoj

Ĉie la funkciado de organizaĵoj ofte dependas de la agado de kelkaj malmultaj membroj. Tio bedaŭrinde ankaŭ validas por GIL. Nuntempe la ĉi-rilata situacio estas nekontentiga. Se iuj el tiuj membroj ne plu povos kunlabori, la pluekzisto de GIL estos endanĝerigata. Ankoraŭ GIL ne sukcesis disponi pri sufiĉe larĝa laborpreta aktivularo.

Kvankam takseblas pozitiva la fakto, ke la jarkonferencojn partoprenas certa stabila parto de la membraro, tamen ĉiam temas pri pli-malpli la samaj homoj. GIL

[10] Kp. la verkojn de Liu Haitao en IpI n-roj 12-13 (1-2/1995) kaj 20 (1/97). Liu Haitao ankaŭ eldonas ĉinlingvan interlingvistikan informilon sur la bazo de GIL-materialoj, informante ĉinajn lingvistoj, kaj aranĝis interlingvistikan retpaĝon, kies URL estas `http://htliu.yeah.net`

[11] Jare aperas kvar ampleksaj volumoj, kiuj reproduktas la enhavtabelojn de ĉ. 350 lingvistikaj/filologiaj/tradukscienca j revuoj de la mondo, kun latina kaj cirila alfabetoj.

ankoraŭ ne sukcesis vere aktivigi ĉiujn siajn membrojn kaj ankoraŭ ne sufiĉe allogas aliajn sciencistojn.

La limigitaj fortoj de la estraro ankoraŭ ne sukcesis sufiĉe disradii en la lingvistikan medion.

En tiu senco GIL prezentas modelon kun kelkaj strukturoj, kiuj principe funkcias bone, kvankam la rezultoj ankoraŭ estas limigitaj. Tamen ili montras, ke estas atendeblaj pli grandaj rezultoj, depende de la investebla laborforto.

7. GIL – ĉu eventuale instigo por aliaj?

Mi iom pli detale prezentis GIL, ĉar mi opinias, ke estus utile, establi en diversaj naciaj medioj similajn aŭ aliajn neesperantistajn sciencajn societojn aŭ instancojn. Ili povus kolekti interlingvistike interesitajn personojn, kiuj ofte agadas izolite kaj ne estas sufiĉe informitaj pri tio, kion faras aliaj interlingvistoj. Tia organizaĵo povus kontakti alilandajn similajn partnerojn kaj kunlabori kun ili. Ili povus esti seriozaj kontaktpartneroj por alidisciplinaj sciencaj medioj, kie esperantistaj organizaĵoj aŭ instancoj ne estus agnoskitaj, ĉar suspektindaj pro atendebla poresperanta partieco.

Se laŭ la diversaj kondiĉoj sur landa ebeno la interlingvistoj/esperantologoj organiziĝus, ili donus pli aktivan bazon por internaciaj aktivecoj, ol tion ĝis nun povis realigi ekzemple CED.

Kiu volus iom pli informĝi pri GIL, vizitu ĝian hejmpaĝon en Interreto, kies URL estas `http://www.snafu.de/~ubecker/gesellsc.htm` aŭ kontaktu la aŭtoron.

Literaturo

Becker, Ulrich, red.

1996 *Translation in Plansprachen. IntI*, Beiheft 1, 70 pp. (Prelegoj de la 5-a jarkonferenco de GIL, 1995.)

1997 *Terminologiewissenschaftliche Aspekte der Interlinguistik. IntI*, Beiheft 2, 54 pp. (Prelegoj de la 6-a jarkonferenco de GIL, 1996.)

1998 *Soziokulturelle Aspekte von Plansprachen. IntI*, Beiheft 4, 60 pp. (Prelegoj de la 7-a jarkonferenco de GIL, 1997, i.a. kun kontribuoj en Ido kaj Interlingua.)

Becker, Ulrich kaj Wollenberg, Fritz, red.

1998 *Eine Sprache für die Wissenschaft.* Beiträge und Materialien des Interlinguistik-Kolloquiums für Wilhelm Ostwald am 9. November 1996 an der Humboldt-Universität zu Berlin. *IntI*, Beiheft 3, 120 pp. (Kun enkondukoj de Blanke kaj Wollenberg krom en la germana ankaŭ en Esperanto kaj Ido.)

Blanke, Detlev

1990 Interlinguistik in der DDR. Eine Bilanz. *der esperantist* **26**, n-ro 163 (5), 110–117.

1995 Esperanto kaj lingvistiko – sciencpolitikaj aspektoj. *Esperanto-Dokumentoj* **2**, 3–21. Osnabrück: Deutsches Esperanto-Institut.

1996 Wege zur interlinguistischen und esperantologischen Fachliteratur. *LPLP* **20**, n-ro 2, 168–181.

1998a Pri la aktuala stato de interlingvistiko. Kelkaj teoriaj kaj scienc-organizaj problemoj. En: Carlevaro, Tazio: *Domaine de la recherche en linguistique appliquée,* pp. 6–94. Bellinzona: Hans Dubois.

1998b Pri kio verkas esperantologoj kaj kie trovi iliajn publicaĵojn? En: Gecsö, Tamás (red.): *Memorlibro. Kolekto de la prelegoj dum la solena internacia konferenco organizita okaze de la tridekjariĝo de la universitata fako Esperantologio*, pp. 14–35. (Budapeŝto 1997 04 17–18.) Budapeŝto: Universitato Eötvös Loránd.

1998c Interlinguistik und Plansprachen. *Sitzungsberichte der Leibniz-Societät* **21**, 2, 45–76.

Fiedler, Sabine

1998 *Plansprache und Phraseologie: Empirische Untersuchungen zu reproduziertem Sprachmaterial im Esperanto.* Habilitationsschrift, 400 pp. Lepsiko: Universität Leipzig, Philologische Fakultät.

Kürschner, Wilfried

1994 *Linguistenhandbuch.* Du volumoj, kune 1190 pp. Tübingen: Narr.

Kürschners Deutscher Gelehrtenkalender

1996 Geistes- und Sozialwissenschaften. 17. Ausgabe, 1910 pp. Berlino · NovJorko: de Gruyter.

Mattusch, Max Hans-Jürgen

1999 *Vielsprachigkeit: Fluch oder Segen für die Menschheit? Zu Fragen einer europäischen und globalen Fremdsprachenpolitik.* 321 pp. Frankfurt am Main k.a.: Peter Lang.

Sakaguchi, Alicja

1998 *Interlinguistik. Gegenstand, Ziele, Aufgaben, Methoden.* 492 pp. Frankfurt am Main k.a.: Peter Lang.

Schubert, Klaus

1989 Interlinguistics – its aims, its achievements, and its place in language science. En: Schubert, Klaus (red.): *Interlinguistics. Aspects of the Science of Planned Languages,* pp. 7–44. Berlino · NovJorko: Mouton de Gruyter.

Silagi, Denis

1996 Der Name “Interlingua”. *IntI* **5**, Nr. 20 (2/96), 6–10.

Mallongigoj

IpI *Informilo por Interlingvistoj* (abonebla ĉe UEA)
IntI *Interlinguistische Informationen* (abonebla ĉe GIL)
LPLP *Language Problems & Language Planning*
ks kaj sekvaj paĝoj

Detlev Blanke doktoriĝis kaj habilitiĝis pri interlingvistikaj temoj en GDR, estis nomumita Honoraria Docento pri Interlingvistiko en Humboldt-Universitato (orienta Berlino), kie li ankoraŭ prelegas. Li estas membro de la redaktaj komitatoj de *Language Problems & Language Planning* kaj *Esperantologio / Esperanto Studies.* Li estas prezidanto de GIL.

Adreso de la aŭtoro: Otto-Nagel-Straße 110, DE-12683 Berlin
Retadreso: blanke.gil@snafu.de

Ricevita 1999 01 15; en reviziita formo 1999 03 10